


174







Tutmonda Biblioteko je la memoro
de L. Tolstoj.

№ 3

UNUA ŜTUPO,

AU SENMORTIGA NUTRADO.

VERKO DE

L. Tolstoj.

Unua Honora Prezidanto de la Internacia Unuiĝo
de Esperantistaj vegetaranoj.

*El la rusa lingvo esperantigis
Anna Ŝarapov, nacia sekretario
por Rusujo de J. U. E. V.*



ELDONO DE LA FIRMO

„POSREDNIK“ (PERANTO).

№ 1018.

Moskvo, 1912.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.

Esper. 114 I



Типо-литогр. Т-ва И. Н. Кушнеревъ и К^о. Пименовская ул., с. д.
Москва—1912.

UNUA ŜTUPO *).

I.

Se homo faras ian aferon ne por monro, sed kun deziro ĝin plenumi, li neeviteble agas laŭ unika sinsekveco, difinita per la esenco de l'afero. Se homo faras pli malfrue tion, kio laŭ esenco de l'afero devus esti farita antaŭe, aŭ se li tute preterlasas tion, kion necesas fari, por povi daŭrigi la aferon, li certe faras la aferon ne serioze, sed nur ŝajnigas. Ĉi tiu regulo nepre restas ĝusta kaj en materiaj, kaj en nemateriaj aferoj. Kiel oni ne povas serioze deziri baki panojn, se oni ne knedis farunon, ne elhejtis, kaj ne elbalais fornon k. t. p.,— tiel same oni ne povas serioze deziri konduki bonan vivon, ne plenumante certan sinsekvecon en akirado

*) Rimarko. Tiu ĉi artikolo estas skribita, kiel antaŭparolo por la eldonita de la firmo „Posrednik“ (Peranto) rusa traduko de la angla libro „The Ethics of Diet“ by Howard Williams M. A. (La etiko de nutraĵo), enhavanta vastan kolekton da aŭtobiografioj kaj eltiraĵoj el la verkoj de diversaj eminentaj pensuloj el ĉiuj tempoj, ribelantaj kontraŭ la vianduzado de homoj. Tiu ĉi libro aperis en la nova serio de la eldonoj de „Posrednik“—„Por inteligentaj legantoj“ (Rusa eldono de 1897).

de kvalitoj, necesaj por tio. Tiu regulo en la aferoj de bona vivo estas precipe grava, ĉar ĉe materia afero kiel, ekzemple, en bakado de pano, oni povas distingi, ĉu homo serioze sin okupas per l'afero aŭ nur ĝin ŝajnigas, laŭ la rezultoj de lia agado. Ĉe la konduko de bona vivo tia kontrolo ne estas ebla. Se homoj, ne kne-dante farunon, ne hejtante fornon, kvazaŭ en teatro, nur ŝajnigas, ke ili bakas panon,—laŭ la rezultoj—la malesto de pano—estos evidente por ĉiu, ke ili nur ŝaj-nigis; sed se homo ŝajnigas, ke li kondukas bonan vi-von, ni ne havas tiajn klarajn montrilojn, laŭ kiuj ni povus sciigi, ĉu li serioze celas konduki bonan vivon, ĉar sekvoj de bona vivo ne nur ne ĉiam estas pal-peblaj kaj klarvideblaj por ĉirkaŭantoj, sed tre ofte ŝaj-nas al ili malutilaj; la estimo kaj konfeso de l'utileco kaj de l'agrableco de ies agado por samtempuloj neniel pravas realecon de lia bona vivo.

Kaj tial, por distingi realon de bona vivo de ĝia ŝajno estas precipe kara la distingilo, konsistanta en re-gule sinsekva akirado de ecoj necesaj por bona vivo. Valora estas tiu ĉi distingilo prefere ne por konfesi verecon de celadoj al bona vivo en aliaj, sed por kon-fesi ĝin en ni mem, ĉar ni en tiu rilato emas trompi nin mem ankoraŭ pli, ol aliajn.

Regula sistemeco en akirado de bonaj kvalitoj estas neĉesa kondiĉo de movado al bona vivo, kaj tial ĉiuj instruintoj de l'homaro konsilis al homoj certan grade-con en akirado de bonaj kvalitoj.

En ĉiuj moralaj doktrinoj estas starigata tiu ŝtuparo,

kiu, laŭ la ĥina saĝeco, leviĝas de tero al ĉielo kaj kiu ne povas esti suprenirata alie, ol de plej malsupra ŝtupo. Kiel en la doktrinoj de bramanoj, buddanoj, konfucianoj,—tiel en la doktrino de grekaj saĝuloj estas starigataj la ŝtupoj de l'virto, kaj la superajn oni ne povas atingi, ne al kutimiĝinte al la malsupera. Ĉiuj moralaj gvidantoj de l'homaro, religiaj, kiel nereligiaj, konfesadis neceson de difinita ordo en akirado de l'virtoj, necesaj por bona vivo; ĉi tiu neceso rezultas el la esenco mem de l'afero, kaj tial, ŝajnas, devus esti konfesata de ĉiuj homoj.

Sed mirinde! La konscio pri la necesa gradigado de kvalitoj kaj agoj, fundamentaj por bona vivo, kva-zaŭ perdiĝas ĉiam pli kaj pli kaj restas nur meze de asketoj, monaĥoj. La monduloj, male, opinias kaj konfesas, ke estas eble akiri plej superajn ecojn de bona vivo ne nur ĉe malesto de malsuperaj ecoj, dependigantaj la superajn, sed ĉe plej granda disvolvo de malvirtoj; el tio sekvas, ke la koncepto pri la konsisto de bona vivo atingas niatempe ĉe plejmulto da monduloj plej fortan gradon de komplikeco. Oni forgesis la ideon pri tio, kio estas bona vivo.

II.

Okazis tio, laŭ mia opinio, jenmaniere.

La kristanismo, anstataŭante la idolismon, prezentis moralajn postulojn, pli altajn, ol idolanaj, kaj, ĉar alie ne povis esti, prezentante siajn postulojn, starigis, same,

kiel en idolana moralo, unikan necesan sinsekvecon, por akiri la virtojn, aŭ ŝtupojn, por atingi bonan vivon.

La virtoj de Platono, komenciĝante per abstinenco, dank'al kuraĝo kaj saĝeco, atingadis la justecon; la virtoj de kristanoj, komenciĝante per abnegacio, dank'al sindonemo al la volo de Dio, atingas bonvoleman, senliman amon.

La homoj, serioze konvertiĝintaj al la kristismo kaj celadintaj sin kutimigi al bona kristana vivo, ĝuste tiel komprenadis la kristismon kaj ĉiam komencadis la bonan vivon per abstinenco de siaj voluptoj, bazita sur la sindetenemo de idolanoj.

Krista doktrino nur tial anstataŭis la idolisman, ke ĝi estas alia kaj pli alta, ol la idolisma. Sed Krista doktrino, same, kiel la idolismo, kondukas homojn al vero kaj bono; ĉar la vero kaj bono estas ĉiam la samaj,—la vojo al ili devas esti ankaŭ la sama, kaj la unuaj paŝoj sur tiu vojo neeviteble devas esti la samaj, kiel por kristano, tiel por idolano.

Krista doktrino pri la bono diferencas de l'idolisma nur per tio, ke la idolismo estas doktrino de fina perfektigo; la kristanismo—de senfina [perfektigo. Platono, ekzemple, montras kiel idealon de perfektigo—la justecon; la idealo de Kristo estas senfina perfektigo en amemo. „Estu perfektaj, kiel Patro via ĉiela“. El tio rezultas malsama rilato de l'idolismo kaj de l'kristismo al diversaj gradoj de virtoj.

Laŭ la idolismo plej supera virto estas atingebla kaj ĉiu grado de atingo havas sian relativan signifon; ju

pli alta estas la grado, des pli da merito ĝi enhavas, tiel ke de l'idolisma vidpunkto homoj estas dividataj je virtaj kaj malvirtaj, je pli aŭ malpli virtaj.

Laŭ Krista doktrino, stariginta idealon de senfina perfektigo, tia divido ne povas ekzisti. Ne povas esti ankaŭ gradoj superaj kaj malsuperaj. Laŭ Krista instruado, montrinta la senfinecon de l'perfektigo, ĉiuj gradoj estas egalaj inter si rilate al la senfina idealo.

La diverseco de meritoj en la idolismo montriĝas per la gradoj, atingitaj de homo; en la kristismo la diverseco konsistas nur en la procedo de atingo, en pli—malpli granda rapido de movado. De l'idolista vidpunkto homo, posedanta la virton de prudento, havas pli altan moralan signifon, ol homo, ne posedanta tiun virton; homo, posedanta, krom prudento, ankaŭ kuraĝon, staras ankoraŭ pli alte; homo, posedanta prudenton, kuraĝon kaj, krom tio, justecon, staras ankoraŭ pli alte. Male, inter kristanoj nek unu, nek alia povas esti konsiderata pli alta en morala rilato; kristano estas des pli kristano, ju pli rapide li moviĝas al senfina perfektigo, sendepende de l'grado, sur kiu li nunmomente troviĝas.

La senmova virteco de fariseo estas malpli valora, ol la pentmovo de la rabisto sur la kruco.

Sed en tio, ke la movado al virto, al perfektigo ne povas fariĝi preter malsuperaj gradoj de virto en la idolismo same, kiel en la kristanismo,—en tio ne povas esti diferenco.

Kristano, simile al idolano, ne povas ne komenci laboron de perfektigo per la vera komenco, t. e. per

tio sama, per kio ĝin komencas idolano, nome per sindetenemo, same kiel ne povas tiu, kiu deziras atingi la supron de ŝtuparo, ne komenci per la unua ŝtupo. La diferenco konsistas nur en tio, ke por idolano la sindetenemo per si mem vidiĝas, kiel virto; male, por kristano la sindetenemo estas nur parto de abnegacio, konsistiganta necesan kondiĉon de celado al perfektigo. Kaj tial la vera kristismo en sia elmonro ne povis malakcepti la virtojn, montritajn ankaŭ per la idolismo.

Sed ne ĉiuj homoj komprenis la kristismon, kiel celadon al la perfektigo de Patro Ĉiela; la Kristanismo, erare komprenita, neniigis la sincerecon kaj la seriozecon en la rilato de homoj al ĝia morala doktrino.

Se homo kredas, ke li povas sin savi, ne plenumante la moralon de l'kristismo, li nature pensas, ke liaj penoj al boneco estas troaj. Kaj tial homo, kredanta je tio, ke ekzistas savrimedoj ekster personaj penoj, por atingi la perfektigon, ne povas celadi tion kun la sama energio kaj seriozececo, kun kiu celadas homo, scianta nenian aliajn rimedojn, krom personaj penoj. Kaj ne celante tion kun plena seriozececo, sciante aliajn rimedojn krom personaj penoj, homo neeviteble malŝatas tiun unikan neŝanĝeblan ordon, en kiu povas esti akirataj la bonaj kvalitoj, necesaj por bona vivo. Tio sama okazis al la plimulto da homoj eksteramaniere konfesantaj la kristanismon.

III.

La doktrino pri tio, ke personaj penoj ne estas necesaj, por ke homoj atingu spiritan perfektigon, sed ke

tiucele ekzistas aliaj rimedoj, kaŭzas la malfortiĝon de celado al bona vivo kaj la flankeniĝon de la sinsekveco, necesa por la bona vivo.

Grandega amaso da homoj, akceptintaj la kristanisman, profitis la anstataŭon de l'idolismo per la kristanismo, por, liberiĝinte de la postuloj de idolanaj virtoj, kvazaŭ jam nenecesaj por kristano, sin liberigi de ĉiu neceso de batalo kontraŭ sia besta naturo.

La samon faris ankaŭ homoj, ĉesintaj kredi sole la eksterecon de kristanismo. Ili tiel same, kiel tiuj kredantoj, elmontrante anstataŭ ekstera kristaneco iun ŝajnan bonan agon, kiel ekzemple servadon al scienco, al arto, al homaro,—je nomo de tiu ŝajna bona ago sin liberigas de la sinsekveco en akirado de la kvalitoj, necesaj por bona vivo, kaj kontentiĝas, ŝajnigante kvazaŭ sur scenejo, ke ili vivas bonamaniere. Tiaj homoj, forlasintaj la idolismon kaj ne akceptintaj la kristismon en sia vera senco, komencis prediki la amon al Dio kaj al homoj sen abnegacio kaj la justecon sen sindetenemo, t. e. prediki superajn virtojn sen atingo de malsuperaj, t. e. ne la virtojn mem, sed nur iliajn ŝajnojn.

Unuj predikas la amon al Dio kaj al homoj sen abnegacio, aliaj—humanecon, servadon al homoj, al homaro sen sindetenemo.

Kaj ĉar tia predikado indulgas bestan naturon de homo je preteksto de enkondukado lin en superajn moralajn sferojn, liberigante lin de plej elementaj postuloj de moraleco, plej delonge eldiritaj de idolanoj, kaj ne nur forjetitaj sed plifortigitaj de vera kristismo, ĝi estis vo-

lonte akceptita kiel de kredantoj, tiel de nekredantoj. Ĝus aperis encikliko de papo pri la socialismo. Tie, post la refuto de l'opinio de socialistoj pri la maljusteco de propraĵo, estas senĝene dirite, ke „neniu, sendube, havas la devon helpi proksimulon, donante el tio, kion li mem aŭ lia familio bezonas, nek eĉ malpliigi ion el tio, kion postulas de li decreguloj. Neniu efektive devas vivi kontraŭ la moroj“. (Ĝi estas citato el sankta Tomaso: *Nullum enim inconvenienter debet vivere*). „Sed fordoninte, kion postulas neceso kaj ekstera konveneco“, daŭrigas la encikliko: ĉiu havas devon—doni la superreston al malriĉuloj“.

Tiel predikas ĉefo de unu el la eklezioj plej disvastigitaj nuntempe. Kaj samtempe kun tiu prediko de l'egoismo, ordonanta fordoni al la proksimulo tion, kion oni ne bezonas, estas predikata amo kaj konstante kun patoso oni citas la famajn vortojn de Paŭlo el la 13-a ĉapitro de 1-a Epistolo al Korintanoj pri la amo.

Malgraŭ tio, ke la tuta doktrino de l'Evangelio estas plenplena de postuloj de abnegacio, de montroj de tio, ke la abnegacio estas unua kondiĉo de kristana perfektigo; malgraŭ tiel klaraj eldiroj, kiel: „kiu ne prenos sian krucon... kiu ne kuraĝos malobei sian patron, patrinon... kiu ne fordonos sian korpan vivon“... homoj kredigas al si kaj al aliaj, ke estas eble ami homojn, ne forlasante ne nur tion, al kio oni kutimis, sed ankaŭ tion, kion ni mem konsideras konvena por ni.

Tiel diras pseŭdo-kristanoj, kaj precize same pensas kaj parolas, kaj skribas, kaj agas homoj, malkonfe-

santaj ne nur eksteran, sed ankaŭ veran kristanan doktrinon,—liberpensuloj. Tiuj homoj kredigas al si kaj al aliaj, ke, tute ne malpliigante siajn bezonojn, ne venkante siajn voluptojn, oni povas servi al homoj kaj al homaro, t. e. konduki bonan vivon.

Homoj forjetis la idolanan sinsekvecon de virtoj kaj ne asimilinte la kristan doktrinon en ĝia vera senco, ne akceptis ankaŭ la kristanan sinsekvecon kaj restis sen nenia gvidado.

IV.

En antikvaj tempoj, kiam krista doktrino ankoraŭ ne aperis,—ĉiuj instruantoj de l'vivo, komencante de Sokrato, konsideris, kiel unuan virton de l'vivo la sindetemon *ἐγκράτεια* aŭ *σωφροσύνη*, kaj oni komprenadis, ke ĉiu virto devas komenciĝi de ĝi kaj esti praktikata kune kun ĝi. Estis klare, ke homo, ne reganta sin mem, disvolvinta en si grandegan kvanton da voluptoj kaj subiganta al ĉiuj ili, ne povis konduki bonan vivon. Estis klare, ke antaŭ ol homo povis pensi ne nur pri grandanimeco, pri amo, sed eĉ pri neprofitemo, pri justeco,—li devis lerni regi sin mem.

Laŭ niaj opinioj ĉio tio ne estas necesa. Ni plene kredas, ke homo, disvolvinta siajn voluptojn ĝis tia alta grado, en kia ili estas disvolvita en nia mondo, homo, ne povanta vivi sen kontentigo de cento da malnecesaj kutimoj, estrantaj lin, povas konduki tute moralan, bonan vivon.

Niatempe kaj en nia mondo la celado al la malpliigo

de siaj voluptoj estas konsiderata ne nur ne unua, sed eĉ ne lasta kaj tute ne necesa agado por konduki bonan vivon.

Laŭ la reganta, plej disvastigita nuntempa vivdoktrino, la pliigo de bezonoj estas konsiderata, male, kiel dezirinda kvalito, signo de inteligenteco, de civilizacio, de kulturo kaj de perfektigo. La tiel nomitaj klezuroj opinias, ke la kutimoj de komforto, t. e. de dorlotiteco, estas kutimoj ne nur ne malutilaj, sed bonaj, montrantaj certan moralan altecon de homo, preskaŭ virton.

Ju pli da bezonoj oni havas, ju pli rafinitaj estas tiuj bezonoj, des pli bona tio ĉi ŝajnas.

Nenio tiel klare konfirmas ĝin, kiel la priskriba poezio kaj precipe romanoj de l'pasinta kaj de nia jarcentoj.

Kiel estas figurataj herooj kaj heroinoj, prezentantaj idealojn de virtoj?

En plimulto da okazoj la viroj, kiujn oni opinias prezentantaj ion altspiritan kaj noblan, komencante de Ĉajld (Child) Harold kaj ĝis la lastaj herooj de Feljé, Trollop, Mopassan, estas nenio alia, ol diboĉaj parazitoj, por nenio, por neniu necesaj; kaj la heroinoj estas malĉastulinoj, pli-malpli liverantaj eksciton de volupto al viroj, tiel same senlaboraj kaj sindonaj al lukso.

Mi ne parolas pri malofte renkontata en la literaturo figurado de vere sindetenemaj kaj laborantaj personoj — mi parolas pri la tipo ordinara, prezentanta idealon por la popolamaso, pri la persono, simili al kiu penas plimulto da viroj kaj virinoj. Mi memoras, ke kiam

mi skribis romanojn, tiam neklarigebla por-mi embaraso, en kiu mi troviĝis kaj kontraŭ kiu mi batalis kaj kontraŭ kiu, kiel mi scias, batalas ĉiuj romanistoj, havantaj almenaŭ la plej malklaran konscion pri tio, kio konsistigas la veran moralan belecon,—estis tio, kiel figuri tipon de salonulo ideale bona, bonkora kaj samtempe tia, kiu vere prezentus la realecon.

V.

Nedubebla pruvo de tio, ke efektive niaj samtempuloj ne konfesas tion, ke idolista sindetenemo aŭ kristana abnegacio estas ecoj dezirindaj kaj bonaj, sed konsideras pliiĝon de bezonoj, kiel io bona kaj altiga, estas maniero, en kiu estas edukata plejmulto da infanoj de nia mondo. Oni ne nur ne kutimigas ilin al sindetenemo, kiel ĝi estis ĉe idolanoj, kaj al abnegacio, kiel ĝi devus esti ĉe kristanoj, sed konscie inokulas al ili kutimojn de dorlotiteco, de fizika senlaboremo kaj de lukso.

Mi de longe volis skribi tian fabelon: virino, ofendita de alia, dezirante sin venĝi, ŝtele forportas infanon de ŝia malamikino, iras al sorĉisto, petante lin sciigi al ŝi, per kio ŝi plej pereige povas revenĝi ŝian malamikino sur la sola rabita infano. La sorĉisto konsilas al la rabistino forporti la infanon en la lokon, montritan de li, kaj certigas, ke la venĝo estos plej terura. La venĝema virino faras tion, sed observas, kio okazas al la infano, kaj al ŝia miro vidas, ke la infano estas prenita kaj

filigita de seninfana riĉulo. Ŝi iras al la sorĉisto kaj riproĉas lin, sed la sorĉisto ordonas atendi.

La infano kreskas meze de lukso kaj dorlotiteco. La kolera virino estas konsternita, sed la sorĉisto ordonas atendi. Kaj efektive venas tempo, kiam la malbona virino estas kontentigita kaj eĉ bedaŭras sian viktimon. La infano kreskas en dorlotado kaj sendisĉiplineco kaj, dank'al sia bonkoreco, ruiniĝas. Kaj tiam sekvas tuta vico da fizikaj suferoj, da mizero kaj da humiliĝoj, al kiuj li estas precipe sentema kaj kontraŭ kiuj li ne scias batali: la celado al morala vivo kaj malforteco de korpore dorlotita, kutimigita al lukso kaj senokupeco. Vana batalado, lia moraleco ĉiam pli malaltiĝas; li drinkadas, por sin forgesi, kaj finas per krimo aŭ frenezo aŭ memmortigo.

Efektive, oni ne povas sen teruro vidi edukadon de iuj infanoj en nia mondo. Nur plej venĝema malamiko povus tiel zorge inokuli al infano tiujn senenergiĝojn kaj malvirtojn, kiujn inokulas al ĝi gepatroj, precipe patrinoj. Oni teruriĝas vidi ĝin kaj ankoraŭ pli ĝiajn sekvojn, se oni scias vidi tion, kio fariĝas en la koroj de plej bonaj el tiuj infanoj, zorge pereigataj de gepatroj mem.

Inokulitaj estas kutimoj de sindorlotigo, inokulitaj tiam, kiam juna estaĵo ne ankoraŭ komprenas ilian moralan signifon. Neniigita estas ne nur kutimo de sindetenemo kaj memregado, sed, male al tio, kio fariĝis ĉe edukado en Sparta kaj ĝenerale en antikva mondo, oni tute atrofiis tiun ĉi kapablon. Ne nur homo ne estas kutimi-

gita al laboro, al ĉiuj kondiĉoj de ĉia fruktodona laboro, de koncentrigita atento, de streĉiĝo de fortoj, de persisteco, de entuziasmiĝo per afero, de povoscio por rebonigi ion difektitan, de kutimo al laciĝo, de ĝojo pri plenumado, sed ankaŭ li estas kutimigita al senokupemo kaj malŝatemo de ĉia produkto de laboro; li estas kutimigita difekti, ĵeti kaj denove per mono akiri ĉion, kion li ekdeziras, eĉ neniam pensante pri tio, kiel io fariĝas. Al la homo mankas kapablo, por akiri unuan virtuton, postulatan de sekvordo por akiri ĉiujn aliajn,—la prudenton, kaj li troviĝas en la mondo, en kiu oni predikas kaj kvazaŭ estimas altajn virtojn de justeco, de servado al homoj, de amo. Bone jam estas, se juna homo havas naturon morale malfortan, ne profundesantan, ne komprenantan la diferencon inter la ŝajna bona vivo kaj la vera, kaj kiu povas kontentiĝi per malbono, reganta en la mondo.

Tiaokaze, ĉio aranĝiĝas kvazaŭ bone, kaj kun ne vekiginta morala sento tia homo iafoje trankvile vivas ĝis la morto. Sed ne ĉiam tiel okazas, precipe en lasta tempo, kiam la konscio pri senmoraleco de tia vivo kvazaŭ flugadas en aero kaj nevole enfalas en koron. Ofte, kaj ĉiam pli ofte okazas tiel, ke la postuloj de vera, neŝajna moraleco vekigas, kaj tiam komenciĝas interna plej turmenta batalado kaj suferoj, malofte finiĝantaj per venko de morala sento. La homo sentas, ke lia vivo estas malbona, ke li devas ĝin ŝanĝi tute radikale, kaj li penadas tion fari; sed tiam homoj, havintaj la saman bataladon, sed ne sukcesintaj en ĝi,

ĉiuflanke atakas tiun, kiu penas aliigi sian vivon, kaj uzas ĉiujn rimedojn, por inspiri al li, ke tio estas tute nenecesa, ke sindetenemon kaj abnegacion oni tute ne bezonas, por esti bona, ke oni povas, sin donante al tromangêmo, sinornamemo, fizika senlaboremo, eĉ al malĉasteco, esti tute bona, utila homo. Kaj la batalado plejparte finiĝas malsukcese. Elturmentita per sia malforteco, iu homo submetiĝas al tiu ĝenerala opinio kaj sufokas en si la voĉon de konscienco, malsincerigas sian spiriton, por sin pravigi, kaj daŭrigas konduki la saman diboĉan vivon, pravigante sin per tio, ke li ĝin pardonigas per kredo je ekstera kristanismo aŭ je servado al scienco, al arto; alia bataladas, suferas kaj freneziĝas aŭ sin mortpafas. Malofte okazas, ke meze de ĉiuj delogoj, ĉirkaŭantaj homon de nia mondo, li komprenas, kio estas kaj estis antaŭ miljaroj plej elementa vero por ĉiuj prudentaj homoj, nome tion, ke, por atingi bonan vivon, necesas antaŭ ĉio ĉesi vivi malbonmaniere, kaj ke por atingi iaĵn superajn virtojn, necesas antaŭ ĉio akiri la virton de sindeteno aŭ sinmemregado, kiel ĝin difinis la idolanoj, aŭ la virton de abnegacio, kiel ĝin difinas la kristanismo,—kaj kompreninte ĉion tion ĉi komencis iom post iom, streĉante siajn fortojn, atingadi ĝin.

VI.

Mi ĵus legis la leterojn de nia altklera progresema homo de kvardekaj jaroj *), bonvola ekzilito Ogarjöv al

*) „Homo de kvardekaj jaroj“—partopreninto en progresema movado en Rusujo dum kvara deko de la deknaŭa jarcento.

alia ankoraŭ pli altklara kaj talentplena homo—Hercen. En tiuj leteroj Ogarjöv eldiras siajn intimajn pensojn, elmetas siajn plej superajn aspirojn, kaj oni ne povas ne vidi, ke li pro inklinoj, propraj al junulo, iom pozas je sia supereco antaŭ sia amiko. Li parolas pri memperfektiĝo, pri sankta amikeco, pri amo, pri servado al scienco, homaro k. t. p. Kaj apude tute trankvile li skribas, ke ofte li kolerigas la amikon, kun kiu li loĝas, per tio, ke, kiel li skribas: „mi revenas (hejmen) ebria aŭ pasigas multajn horojn kun pereinta, sed alloga kreitaĵo." Evidente, korega, talentplena klerulo ne povis eĉ imagi, ke estis io kvankam iomete malinda en tio, ke li, edziĝinto, atendante la akuson de sia edzino (en la sekvanta letero li skribas, ke lia edzino naskis), revenas hejmen ebria, pasigante tempon eĉ malĉastulinoj. Li tute ne povis imagi, ke antaŭ ol komenci batali kaj almenaŭ iomete venki sian inklinon al ebrieco kaj malĉasteco, li pri amikeco, amo kaj eĉefe pri servado al io tute ne rajtis pensi. Kaj li ne nur ne batalis kontraŭ tiuj malvirtoj, sed evidente konsideris ilin, kiel iom tre ĉarmetaj, neniel malhelpantaj celadon al memperfektiĝo, kaj tial ne nur ne kaŝis ilin de sia amiko, antaŭ kiu li volis sin montri kiel eble plej bona, sed senĝene elmetadis ilin.

Tiel estis antaŭ la duonjarcento. Mi povis ankoraŭ vidi tiujn homojn. Mi konis Ogarjöv kaj Hercen persone, kaj homojn de l'samaj tendencoj, kaj homojn, edukitajn laŭ la samaj tradicioj. Ĉiuj tiuj homoj havis frapantan mankon de sinsekveco en la aferoj de l'vivo. Ili

havis sinceran varmegan soifon de bono kaj plej grandan senbridecon de persona volupto, kiu, laŭ ilia opinio, ne povas malhelpi bonan vivon kaj ne malebligos ilin fari bonajn, eĉ grandajn agojn. Ili metadis nekreditajn panojn en nehejtitan fornon kaj kredis, ke panoj estos bakitaj. Kiam, maljuniĝante, ili komencis rimarki, ke panoj ne estas bakataj, t. e. ke fariĝas nenia bono de ilia vivo, ili vidis en tio precipan tragismon.

La tragismo de tia vivo estas efektive terura. Kaj en la sama tragismo, en kia troviĝis tiutempe Hercen, Ogarjöv kaj aliaj, troviĝas ankaŭ nun multaj kaj multaj tiel nomataj kleraj homoj de nia tempo, konservantaj la samajn vivrigardojn. Homo celadas vivi bonan vivon, sed tiu necesa sinsekveco, postulata por tio, estas perdita en la societo, en kiu li vivas. Kiel antaŭ 50 jaroj Ogarjöv kaj Hercen, tiel same la plejmulto de nuntempaj homoj estas konvinkitaj, ke konduki dorlotan vivon, manĝi dolĉe, grase, ĝuadi, ĉiel kontentigadi sian volupton—ne malhelpas bonan vivon. Sed, kredeble, bonan vivon ili ne atingas, kaj ili sin donas al la pesimismo kaj diras: „tia estas la tragika situacio de homo“.

VII.

La falsa opinio, ke homoj sin donante al siaj voluptoj, opiniante tian voluptan vivon bona, imagas, ke ili povas samtempe konduki bonan, utilan, pravan, ameman vivon, estas tiel miriga, ke homoj de venontaj generacioj, ŝajnas al mi, tute ne komprenos, kian signifon

donis niaj samtempuloj al la vortoj „bona vivo“, dirante, ke manĝeguloj, dorlotituloj, voluptuloj kondukas bonan vivon. Efektive, ni provu nur dum ia tempo forgesi nian kutiman vivrigardon kaj observi ĝin, mi ne diras, de kristana vidpunkto, sed—de idolana,—de vidpunkto, postulanta plej malgrandan justecon, por konvinkiĝi, ke ĝi tute ne meritas la nomon de bona vivo.

Ĉiu homo en nia mondo, por, mi ne diras, komenci bonan vivon, sed nur iomete celi al ĝi, devas antaŭ ĉio ĉesi konduki malbonan vivon, devas komenci detrui kondiĉojn de malbona vivo, en kiu li troviĝas.

Kiel ofte oni aŭdas, por pravigi tion, ke ni ne ŝanĝas nian malbonan vivon, rezonadon pri tio, ke ago, kontraŭanta kutiman vivon, estus nenatura, ridinda, estus deziro sin elmeti, kaj, sekve,—ne bona ago. Tia rezonado estas kvazaŭ intence farita por ke homoj neniam ŝanĝu sian malbonan vivon. Ĉar, se tuta nia vivo estus bona, justa, bonvolema,—nur tiam ĉiu ago, konforma al nia kutima vivo, estus bona. Sed ĉar la vivo estas duone bona, duone malbona,—ĉiu ago, ne konforma al la kutima vivo, havas tiom da ŝancoj esti bona, kiom esti malbona. Se tuta vivo estas malbona, ne-regula,—homo, vivanta tian vivon, ne povas fari eĉ unu bonan agon, ne rompante la kutiman iradon de l'vivo. Oni povas fari malbonan agon, ne rompinte la kutiman iradon de l'vivo, sed oni ne povas fari bonan.

La homo, vivanta nian vivon, ne povas konduki bonan vivon, antaŭ ol forlasi kondiĉojn de malbono, en



kiuj li troviĝas; li ne povas komenci fari bonon, ne ĉe-
sinte fari malbonon.

Ne estas eble al lukse vivanta homo konduki bo-
nan vivon. Ĉiuj liaj penoj, por fari bonajn agojn, estos
vanaj, ĝis kiam li ne ŝanĝos sian vivon, ne faros tiun
unuan agon, kiun postulas de li la sinsekvo de virtoj.
La bona vivo, kiom laŭ idolana mondrigardo, tiom pli
laŭ la kristana, estas mezurata kaj ne povas esti me-
zurata per nenio alia, ol la matematika rilato de egoismo
al altruismo. Ju malpli estas da egoismo kaj da ĝiaj
sekvoj: zorgado pri si mem, laboroj kaj postuloj de aliaj
por si mem, kaj ju pli estas da amo al aliaj kaj ĝiaj
sekvoj: zorgado pri aliaj, laborado por aliaj—des pli
bona estas la vivo.

Tiel komprenis kaj komprenas bonan vivon ĉiuj sa-
ĝuloj de l'mondo kaj ĉiuj veraj kristanoj kaj tute same
ĝin komprenas ankaŭ ĉiuj plej simplaj homoj. Ju pli iu
homo donas al aliaj kaj ju malpli li postulas por si, des
pli bona li estas; ju malpli li donas al aliaj kaj ju pli
li postulas por si, des pli malbona li estas.

Se oni transmovus apogpunkton de levilo de la pli mal-
proksima fino al la pli proksima,—per tio ne nur plilon-
giĝos ĝia pli longa parto, sed ankaŭ mallongiĝos la pli
mallonga. Sekve, se homo, havante ian kapablon de
amo, pligrandigis la amon al si kaj zorgojn pri si, per
tio li malpligrandigis la eblon de amo al aliaj kaj zor-
gojn pri aliaj ne nur je tiu kvanto da amo, kiun li
transportis sur sin mem, sed multfoje pli. Anstataŭ ol
nutri aliajn, homo manĝis ion troan, kaj per tio ne nur

malpliigis eblon fordoni tiun troaĵon, sed eĉ, pro la troa manĝo, sin mem senigis de la eblo zorgi pri aliaj.

Por ĝuste, ne per vortoj, havi kapablon ami aliajn, oni devas ne ami sin mem—ankaŭ ne per vortoj, sed per agoj. Sed ordinare okazas tiel: pri aliaj ni imagas, ke ni ilin amas; ni kredigas tion al ni kaj al aliaj, sed ni amas ilin nur vorte, kaj nin mem—reale. Aliajn ni forgesos nutri kaj kuŝigi; nin mem—neniam. Kaj tial, por vere ami aliajn reale, oni devas lerni forgesi nutri kaj kuŝigi sin mem, tiel same, kiel ni forgesas tion fari rilate la aliajn.

Ni diras „bona homo“ kaj „kondukas bonan vivon“ pri la homo dorlotita, kutiminta al luksa vivo. Sed tiu homo—viro aŭ virino—povas havi plej allogajn trajtojn de karaktero, de mildeco, de bonanimeco, sed ne povas konduki bonan vivon, kiel ne povas esti akra kaj tranĉi tranĉilo de plej bona fabrikado kaj el plej bona ŝtalo, se ĝi ne estas akrigita. Esti bona kaj konduki bonan vivon signifas doni al aliaj pli, ol oni prenas de ili. Sed homo dorlotita kaj kutiminta al luksa vivo, ne povas tion fari, ĉar li mem ĉiam multe bezonas (kaj li bezonas ne pro lia egoismo, sed ĉar li kutimis al tio, kaj lin suferigas seniĝi je tio, al kio li kutimis), kaj due, ĉar, konsumante ĉion, kion li ricevas de aliaj, li per tiu sama konsumado sin malfortigas, sin senigas de eblo labori kaj per tio servi aliajn. Homo dorlotita, mole, longe dormanta, grase, dolĉe aŭ multe manĝanta kaj trinkanta, konvene, varme aŭ malvarmete vestita, ne al kutimiĝinta al streĉiĝo en laboro, povas fari nur tre malmulte.

Ni tiel kutimis mensogi al ni mem kaj al mensogo de aliaj, tiel profite ŝajnas al ni ne vidi la mensogon de aliaj, por ke ili ne vidu nian, ke ni neniel miras kaj neniel dubas, ke oni rajtas proklami virtecon, iafoje eĉ sanktecon de homoj, vivantaj tute senbride. Homo, viro aŭ virino, kuŝas sur lito kun risortoj, kun du matracoj kaj kun du puraj gladitaj litotukoj, sur lanugaj kusenoj, bele tegitaj. Ĉe lia lito kuŝas tapiŝeto, por ke li ne sentu malvarmon, ekpaŝante plankon, kaj tamen tute apude staras pantofloj.

Tie troviĝas ankoraŭ aliaj necesajoj, tiel ke li tute ne bezonas eliri. La fenestroj estas rulkurtenitaj, tiel ke lumo ne povas lin veki, kaj li dormas ĝis la horo, kiun fiksas sia dormemo. Krom tio, estas zorgate, ke vintre estu varme kaj somere—malvarmete, ke lin ne incitu bruo kaj muŝoj kaj aliaj insektoj. Li dormas, kaj jen akvo varmega kaj malvarma por lavado, iafoje por banado aŭ por razado, estas jam preta. Pretigataj estas ankaŭ teo aŭ kafe, ekscitantaj trinkaĵoj, trinkataj tuj post leviĝo. Botoj, ŝuoj, galoŝoj, kelke da paroj, kiujn li malpurigis hieraŭ, jam estas purigataj tiel, ke ili brilas, kvazaŭ vitro, kaj nenia polvo makulas ilin. Same estas purigataj ne tute puraj pro la antaŭtaga portado diversaj vestaĵoj, konformaj ne nur al vintro kaj somero, sed al printempo, aŭtuno, al pluvo, malseka, varmega vetero. Preparigata estas lavita, amelita, gladita pura tolaĵo kun butonetoj, kun butonoj, kun butonruetoj,—ĉio reviziata de homoj, havantaj specialajn oficojn por tio. Se homo estas agema, li leviĝas frue, t. e. je la 7-a horo, t. e. ĉiam nur

du—tri horojn post tiuj, kiuj preparas por li ĉion tion. Krom vestaĵoj por tago kaj kovraĵo por nokto, oni preparas ankoraŭ vestaĵaron (kostumon kaj piedvestojn) por tempo de vestado: noktajn ĥalatojn (surtutojn), pantoflojn; kaj jen la homo iras sin lavi, sin purigi, sin kombi, por kio li uzas kelkajn specojn de brosoj, de sapoj kaj grandan kvanton da akvo kaj da sapo. (Multaj angloj, kaj virinoj precipe, ial fieriĝas per tio, ke ili povas eluzi tre multe da sapo kaj elverŝi sur sin grandan kvanton da akvo). Poste la homo sin vestas, sin kombas antaŭ spegulo alia, ol tiuj, kiuj pendas preskaŭ en ĉiuj ĉambroj, prenas siajn necesaĵojn, kiel plejparte — okulvitrojn aŭ nazumon, — poste dismetas en poŝojn: puran naztukon, por blovpurigi la nazon, kaj poŝhorloĝon kun ĉeneto, kvankam ĉie, kien li venos, preskaŭ en ĉiu ĉambro li vidos horloĝon, prenas monon diversspecan, malgrandajn monerojn ofte en speciala lerte farita ujo (maŝineto), liberiganta de laboro serĉi la neceson, kaj paperetojn, kartetojn, kun lia nomo, presita sur ĝi, liberigantajn lin de laboro diri aŭ skribi, kaj jerton, krajonon.

Por virinoj tualetado estas eĉ multe pli komplika: korseto, hararanĝo, longaj haroj, ornamoj, laĉoj, elastajoj, rubandetoj, ligiletoj, harpingloj, pingloj, broĉoj.

Sed jen ĉio estas finita; oni komencas la tagon ordinarare per manĝo: oni trinkas la preparitan kafon aŭ teon kun granda kvanto da sukero, oni manĝas bulkojn, panon el tritika unuakvalita faruno kun granda kvanto da butero, ialoje da porkaĵo. Viroj plejparte dume fu-

mas cigaredojn aŭ cigarojn, kaj poste legas gazeton freŝan, ĵus alportitan. Poste oni iras el domo por ofico aŭ iu afero, aŭ uzas veturilojn, speciale ekzistantajn, por transporti tiujn homojn. Poste—manĝeto el mortigitaj bestoj, birdoj, fiŝoj; poste — ĉefa manĝo samspeca, ĉe plej granda modesteco, el tri manĝaĵoj, sekvataj de dolĉaĵo, kafo,—poste kartludado, muzikado aŭ teatro, legado aŭ konversacio en molaj risortaj brakseĝoj ĉe plimalpli intensa lumo de kandeloj, de gaso, de elektro, denove—teo, denove—manĝo, noktomanĝo kaj denove—en la li-ton, mole pretigitan, kun pura tolaĵo kaj purigita vazaro.

Tia estas la tago de homo modestviva, pri kiu, se li havas mildan karakteron kaj ne posedas kutimojn, precipe malagrablajn por aliaj, oni diras, ke li estas homo, kondukanta bonan vivon. Sed bona vivo estas vivo de homo, faranta bonon al homoj; kiel povas fari bonon al siaj proksimuloj homo, vivanta tiamaniere kaj kutiminta al tio? Antaŭ ol fari bonon, li devas ja ĉesi fari malbonon al homoj.

Kalkulu ĉiun tiun malbonon, kiun li, ofte mem ne sciante tion, faras al homoj, kaj vi vidos, kiel malproksime li estas de bonagado, kaj multe, multe da heroaĵoj li devas fari, por kompensigi malbonon, faratan de li, kaj nome heroaĵojn li, senenergigita de sia volupta vivo, tute ne povas plenumi. Dormi li povus ja pli sane, en fizika kaj en morala rilato, kuŝante planke sur mantelo, kiel estis dormanta Marko Aŭrelio, kaj tial ĉiuj penoj kaj laboroj pri matracoj kaj risortoj, pri lanugaj

kusenoj, kaj ĉiutaga laborado de lavistino—virino, malfortika estajo kun siaj virinaj malfortiĝoj, akuŝoj kaj mamnutrado de infanoj, lavanta tolajon por li, fortika viro,—ĉiuj tiuj penoj povus ne esti. Li povus kuŝiĝi pli frue kaj leviĝi pli frue, kaj laboro por fenestraj kurtenoj kaj lumigado vespere povus ankaŭ ne esti. Li povus dormi en la sama ĉemizo, kiun li estis portanta dum la tago, povus marŝi nudpiede sur la planko kaj eliri eksteren, povus sin lavi per akvo ĉe la puto, — unuvorte, povus vivi tiel, kiel vivas ĉiuj, kiuj laboras por li ĉion tion, kaj tial ĉiuj tiuj laboroj por li povus ne esti. Povus ne esti ankaŭ ĉiuj tiuj laboroj por liaj vestoj, por lia rafinita nutraĵo, por liaj amuziĝoj.— Kiel do tia homo faros bonon al homoj kaj kondukos bonan vivon, ne ŝanĝinte sian dorlotiĝeman luksan vivon.

Ne povas morala homo,—mi ne diras,—kristano, sed nur konfesanta humanecon aŭ eĉ nur justecon, ne povas ne deziri ŝanĝi sian vivon kaj ne ĉesi profiti je l'objektoj de lukso, kies fabrikado iafoje estas pereiga por aliaj homoj.

Se homo vere kompatas homojn, laborantajn tabakon, unua afero, pri kiu li pensos, estos ĉesi fumi, ĉar, daŭrigante fumadon kaj aĉetante tabakon, li per tio akcelas produktadon de tabako, pereiganta la sanon de homoj.

Sed niaj samtempanoj rezonas ne tiel. Ili elpensas plej diversajn kaj komplikajn rezonadojn, sed nur ne tion, kion nature komprenas ĉiu simpla homo. Laŭ iliaj rezonadoj, oni tute ne bezonas sin deteni de luksaĵoj. Oni

povas kondolenci situacion de laboristoj, fari paroladojn kaj skribi librojn por ilia defendo kaj samtempe daŭrigi profiti por si je la laboroj, kiuj estas opiniataj pereigaj por ili.

El rezonadoj de unuj rezultas, ke uzadi la pereigajn laborojn de aliaj homoj ni havas rajton permesi al ni, ĉar se mi ne ĝuos, alia ĝuos ilin. Tio similas al rezonado, ke oni devas trinki malsanigan vinon, ĉar ĝi estas aĉetita, kaj se—ne mi, aliaj ĝin trinkos.

El rezonadoj de aliaj rezultas, ke, uzante por sia luksa vivo laborojn de tiuj ĉi homoj, ni eĉ faras profiton al ili, ĉar per tio ni donas al ili monon, t. e. eblon de ekzistado kvazaŭ oni ne povus doni al ili eblon de ekzistado per io alia, ol per tio, ke oni devigas ilin fabriki pereigajn por ili kaj superflujajn por ni objektojn. Ĝi devenas de tio, ke homoj imagis al si, ke oni povas konduki bonan vivon, ne kutiminte al unua laŭ la ordo kvalito, necesa por bona vivo.

Kaj tiu ĉi unua kvalito estas sindetenemo.

VIII.

Bona vivo ne estis kaj ne povas esti sen sindetenemo. Ekster la sindetenemo nenia bona vivo estas imagebla. Ĉiu celado al bona vivo devas komenciĝi per ĝi.

Ekzistas ŝtuparo de virtoj kaj oni devas komenci per unua, por atingi sekvantajn, kaj unua virto, al kiu devas sin kutimigi homo, se li volas posedi la sekvantajn, estas tio, kion antikvuloj nomis *ἐγκράτεια* aŭ *σωφροσύνη*, t. e. prudento aŭ memregado.

Kvankam en la kristana doktrino la sindetenemo estas enmetita en koncepton de abnegacio,—tamen la ordo de sinsekvo restas la sama, kaj neniajn kristanajn virt-ojn oni povas akiri sen sindetenemo—ne tial, ke iu tion elpensis, sed tial, ke tia estas la esenco de l'afero.

La sindetenemo estas unua ŝtupo de ĉiu bona vivo.

La sindetenemo ankaŭ atingiĝas ne subite, sed same ŝtupo post ŝtupo.

La sindetenemo konsistas en tio, ke homo liberiĝas de voluptoj kaj submetas ilin al la prudento σοφροσύνη. Sed voluptojn homo havas multajn kaj diversajn,—tial, por ke batalado kontraŭ ili estu sukcesa, homo devas komenci per radikaj voluptoj,—tiaj, el kiuj elkreskas aliaj, pli komplikaj, kaj ne per komplikaj voluptoj, elkreskintaj el la radikaj. Ekzistas voluptoj komplikaj, kiel ornamado de korpo, ludoj, amuziĝoj, babilado, sci-volemo kaj multaj aliaj, sed ekzistas ankaŭ voluptoj radikaj: tromanĝemo, senokupemo, karna amo. En batalado kontraŭ voluptoj oni ne devas komenci de la fino, per batalado kontraŭ voluptoj komplikaj; oni devas komenci per la radikaj, kaj en unu difinita ordo. Tiu ĉi ordo estas difinita kaj per la esenco de l'afero, kaj per la tradicio de homa saĝeco.

Tromanĝemulo ne havas kapablon bataladi kontraŭ maldiligento, kaj tromanĝemulo kaj senokupulo neniam trovos fortojn, por batali kontraŭ la seksa volupto. Tial, laŭ ĉiuj doktrinoj, la celado al la sindetenemo devis komenciĝi per la batalado kontraŭ la volupto de tromanĝemo; ĝi komenciĝis per fasto. Sed en nia mondo, kie

ĝis tia grado estas perdita ankaŭ tiu laŭgradeco, kiun oni bezonas, por akiri tiun fundamentan virton, multaj forgesis pri fasto kaj decidis, ke fasto estas malsaĝa superstiĉo, kaj ke faston oni tute ne bezonas.

Kaj tamen, kiel la unua kondiĉo de bona vivo estas sindetenemo, tial la unua kondiĉo de sindetena vivo estas fasto.

Oni povas deziri esti bona, revii pri la bono, ne fasantante, sed en realeco esti bona sen fasto estas same neeble, kiel iri, ne stariĝinte per piedoj.

Fasto estas necesa kondiĉo de bona vivo. La tromanĝemo, male, ĉiam estis kaj estas unua signo de malajo—de malbona vivo, kaj, bedaŭre, tiu ĉi signo plej supragrade rilatas la vivon de plimulto de niaj samtempuloj. Rigardu vizaĝojn kaj korpostaton de niaj samtempuloj en nia medio,—sur multaj de tiuj personoj kun pendantaj mentonoj kaj vangoj, grasiĝintaj membroj kaj tro grandaj ventroj kuŝas neforigebla stampo de di-boĉa vivo. Kaj ĝi ne povas esti alie. Rigardu atente nian vivon,—tion, per kio moviĝas plimulto de niaj sammondanoj; demandu vin mem, en kio konsistas la ĉefa intereso de l'vivo ĉe la plimulto de niaj samtempuloj—en kontentigo de buŝo, en plezuro de manĝado, manĝegado. Komencante de la plej malriĉaj ĝis la plej riĉaj klasoj de la societo, la tromanĝemo, laŭ mia opinio, estas ĉefa celo, ĉefa plezuro de nia vivo. Malriĉa, laboranta popolo prezentas escepton nur tiagrade, kiom la mizero malhelpas al li sin doni al tiu ĉi pasio. Tuj kiam li trovas tempon kaj rimedojn por tio,—li, imitante

superajn klasojn, havigas al si plej bongustajn kaj dolĉajn manĝaĵojn, manĝas kaj trinkas tiom, kiom nur li povas. Ju pli li estas manĝinta, des pli li opinias sin ne nur feliĉa, sed forta kaj sana. Kaj en tiu konvinko subtenas lin instruitaj homoj, kiuj ĝuste same konsideras nutraĵon. La kleraj klasoj imagas al si, ke feliĉo kaj sano (pri kio ilin kredigas kuracistoj, asertante, ke la plej kara nutraĵo,—viando—estas la plej sana) konsistas en bongusta, nutra, facile digestebla nutraĵo, kvankam ili penas ne paroli tion ĉi.

Rigardu vivon de tiuj ĉi homoj, aŭskultu iliajn konversaciojn. Kiaj altspritaĵoj temoj ŝajne interesas ilin: kaj filozofio, kaj scienco, kaj arto, kaj poezio, kaj distribuo de riĉaĵoj kaj bonstato de popolo, kaj edukado de junularo; sed ĉio tio por grandega plimulto estas mensogo, ĉio tio okupas ilin inter aferoj,—iliaj realaj aferoj,—inter tagmeza kaj posttagmeza manĝoj, kiam stomako estas plena kaj oni ankoraŭ ne povas manĝi. Sola viva, vera intereso,—la intereso de plimulto, kaj de viroj, kaj de virinoj,—ĝi estas—la manĝado, precipe post unua juneco. Kiel manĝi, kion manĝi, kiam, kie?

Nek unu soleno, nek unu ĝojo, nek unu inaŭguracio, malfermo de io ajn ne okazas sen manĝo.

Rigardu vojaĝantajn homojn. Sur ili tio estas aparte videbla. „Muzeo, bibliotekoj, parlamento—kiel interese! Sed kie ni tagmanĝos? Kiu pli bone nutras?“ Rigardu nur homojn, kiel ili kunvenas por ĉefa manĝo, lukse vestitaj, traparfumitaj, al la tablo, ornamita per floroj; kiel ĝoje ili frotas la manojn kaj ridetas. Se

oni enrigardus en la animojn,—kion atendas la plimulto da homoj?—Apetiton por tagmeza, posttagmeza manĝo. En kio konsistas la plej kruela puno, komencante de infanaĝo? — Nutrigi sole per pano kaj akvo.— Kiu el metiistoj ricevas plej grandan salajron? Kuiristoj.—En kio konsistas ĉefa intereso de dommastrino? — Pri kio plejparte ŝatas paroli mezklasaj mastrinoj?—Kaj altklasuloj ne emas paroli pri tio ne tial, ke ili estas pli klare kaj ilin interesas pli superaj temoj, sed nur tial, ke ili havas ekonominon aŭ intendanton (majordomon, ĉefserviston), okupataj per tio kaj garantiantaj iliajn manĝojn. Sed provu senigi ilin je tiu oportunaĵo, kaj vi vidos, pri kio ili zorgas. Antaŭ ĉio ilin interesas demandoj pri manĝo, pri prezo de tetroj, pri plej bonaj rimedoj, por kuiri kafon, baki kuketojn k. t. p.

Jen kunvenas homoj,—je iu ajn preteksto: por bapto, por enterigo, por edziĝo, por sanktigo de preĝejo, por adiaŭdiro, por renkonto, por festado de memordato, de morto, de naskiĝo de granda scienculo, de pensulo, de instruanto de moralo,—kunvenas homoj, kvazaŭ okupataj per plej altaj interesoj. Tiel ili diras; sed ili ŝajnigas: ĉiuj ili scias, ke ili manĝos, agrable, bonguste manĝos kaj trinkos: por tio ja ili ĉefe kunvenis.

Jam antaŭ kelkaj tagoj tiusamcele oni mortpafis kaj buĉis bestojn, oni portadis plenkorbojn da produkto el gastronomiaj magazenoj, kaj kuiristoj, iliaj helpantoj — subkuiristetoj, bufedaj servistoj, speciale vestitaj per puraj amelitaj antaŭtukoj, kapvestoj, „laboradis“. Laboradis ankaŭ iliaj ĉefoj, ricevantaj 500 kaj pli rublojn

monate, disdonante ordonojn. La kuiristoj estis hakantaj, knedantaj, bakantaj, aranĝantaj, ornamantaj.

Kun sama soleno kaj gravŝajnigo laboradis samspeca estro de tablaranĝo, pripensante, almezurante per sia rigardo, kiel artisto. Laboradis ĝardenisto, por floroj... Virinoj lavadis vazarojn... Laboradas armeo da homoj, konsumiĝas produktoj de miloj da labortagoj, kaj ĉion tion oni bezonas, por ke kunvenintoj povu iom paroli pri memorinda granda instruinto de scienco, de moralo, aŭ rememori mortintan amikon aŭ por diri bondezirojn al junaj geedzoj, komencantaj novaŭ vivon.

Ĉe malalta kaj mezalta klasoj oni klare vidas, ke festo,—enterigo, edziĝo,—estas manĝegado. Tie ĝuste tiel oni komprenas la aferon. La manĝegado tiagrade forgesigas pri la motivo mem de kunveno, ke greke kaj france edziĝo kaj festeno estas samnomaj. Sed ĉe alta klaso, meze de rafinituloj, oni uzas grandan arton, por kaŝi tion kaj ŝajnigi, ke manĝado estas afero malĉefa, farata nur pro deepostuloj. Ili ankaŭ bonege povas ŝajnigi tion, ĉar plej parte ili estas supersatigitaj en la vera senco de vorto, neniam ili sentas malsaton.

Ili ŝajnigas, ke manĝon ili ne bezonas, ke ili akceptas ĝin, kiel ŝarĝon, sed ĝi estas mensogo. Provu anstataŭ atenditaj de ili rafinitaj manĝaĵoj doni al ili, mi ne diras,—panon kun akvo, sed kaĉon kaj simplan vermiĉelan supon, kaj vidu, kian malkontentegon ĝi aperigos,—malkaŝante tion, kio ekzistas efektive, nome tion, ke en kunveno de tiuj homoj la ĉefa intereso estas ne tio, kion ili ŝajnigas, sed—la manĝado.

Rigardu, per kio komercas homoj, iru tra urbo kaj rigardu, kion oni vendas: korpornamaĵojn kaj manĝe-
gaĵojn. Esence ĝi devas esti tiel, kaj ne alie. Ne pensi
pri manĝo, limigi tiun ĉi volupton oni povas nur
tiam, kiam homo obeas solon bezonon de manĝado; sed
kiam homo ĉesas manĝi nur pro plenigo de stomako,—
ĝi ne povas esti alie. Se homo ekamis plezuron de
manĝo, permesis al si ami tiun plezuron; se li opinias
tiun plezuron bona,—tiam ne estas limoj por ĝia grandiĝo
kaj kreskado. La kontentigo de bezono havas limojn,
sed la plezuro ne havas ilin. Por kontentigi la bezonon,
estas necese kaj sufiĉe manĝi panon, kaĉon aŭ rizon;
por pligrandigi la plezuron,—oni senĉese elpensas novajn
spicaĵojn kaj algustaĵojn.

La pano estas necesa kaj sufiĉa nutraĵo (tion pruvas
milionoj da homoj fortaj, facilmovaj, sanaj, multe labo-
rantaj sole per pano). Sed povas esti pli agrable manĝi
panon kun spicaĵo. Bone estas ankaŭ trempi panon
en kuirakvo de viando. Ankoraŭ pli bone—meti en
tiun akvon legomojn, kaj por pli da plezuro, diversajn.
Bone estas manĝi ankaŭ viandon, kaj viando pli pla-
ĉas ne kuirita, nur rostita. Ankoraŭ pli plaĉas sanga vi-
ando kaj certaj partoj de viando. Al ĉio tio aldonu lego-
mojn kaj mustardon kaj trinku kun tio vinon, plej bone ru-
ĝan. Oni plu tute ne malsatas, kaj tamen oni povas manĝi
ankoraŭ fiŝon, spicante per saŭco kaj kuntrinkante blan-
kan vinon. Ŝajnus, oni ne povus plu manĝi, nek grasajon,
nek bongustajon. Sed dolĉajon oni povus ja ankoraŭ
manĝi,—somere—glaciaĵon, vintre—kompoton, konfitaĵon

k. t. p. Kaj jen tagmanĝo, modesta tagmanĝo. La plezuron de tiu tagmanĝo oni povus ankoraŭ multe, multe pliigi. Oni pliigas, kaj tia pliigado ne havas limojn: kaj apetitdonaj almanĝaĵoj kaj „entremets“ (manĝetaĵoj) kaj diversaj kombinoj de bongustaĵoj, kaj floroj, kaj ornamaĵoj, kaj muziko dum manĝado.

Mirinda afero,—homoj ĉiutage sin supersatigantaj per tiaj manĝegadoj, kompare kun kiuj la festeno de Baltazaro, festeno elvokinta miraklan minacon, estas nenio,—tiaj homoj naive kredas, ke ili, farante tion, povas konduki moralan vivon.

IX.

Fasto estas necesa kondiĉo de bona vivo, sed rilate la faston, same, kiel rilate al la sindetenemo, aperas la demando, de kio komenci la faston, kiel fasti,—kiel ofte manĝi; kion manĝi, kion ne manĝi? Kaj kiel oni ne povas serioze sin okupi je nenia afero, ne atentante la necesan por ĝi ordon de sinsekvo,—tiel oni ne povas fasti, ne sciante, de kio komenci la faston, de kio komenci la detenemon en nutraĵo.

Fasto. Kaj eĉ fasto analizata: kiamaniere kaj de kio fasti. Tia koncepto ŝajnas ridinda, stranga al plimulto da homoj.

Mi memoras, kiel evangeliano, atakinta kun fiero pro sia originaleco, asketismon de monaĥoj,—diris al mi: mia kristaneco ne estas fasto kaj seniĝoj, sed bifstekoj.

En nian vivon eniĝis tiom da strangaj senmoralaj ideoj,—precipe en tiun elementan regionon de unua paŝo

al bona vivo,—nia rilato al nutrado, rilato, kion ne multaj atentis,—ke ni ne povas eĉ kompreni, kia aroganteco kaj malsaĝeco niatempe proklami kristanecon aŭ virton kun bifsteko.

Nin ne terurigas ja tia proklamo nur tial, ke al ni okazis la strangaĵo, ke ni rigardas kaj ne vidas, aŭskultas kaj ne aŭdas.

Ne ekzistas malbonodoro, kiun homo ne alkutimiĝus flari; ne ekzistas sonoj, kiujn homo ne alkutimiĝus aŭdi; ne ekzistas malbelaĵoj, kiujn li, fine, ne alkutimiĝus trankvile rigardi,—tiel ke li jam ne rimarkas tion, kio mirigas homon, ne kutimintan. La samo fariĝas en la morala regiono.—Kristaneco kaj moraleco—kun bifsteko!

Antaŭ kelkaj tagoj mi vizitis la buĉejon de nia urbo Tula. Nia buĉejo estas konstruita laŭ nova perfektigita sistemo, simile al buĉejoj de grandaj urboj, tiel ke buĉataj bestoj turmentiĝu kiel eble malpli. Ĝi estis vendredon, du tagojn antaŭ Pentekosto. La brutoj estis multaj.

Iam, longe antaŭ tiu tago, legante la belan libron „La Etiko de Nutrado“,—mi ekdeziris viziti buĉejon, por mem propraokule vidi realecon de tiu afero, pri kiu oni nepre devas pensi, parolante pri la vegetarismo. Sed ĝis nun mi hontis fari tion; oni ja ĉiam hontas iri por rigardi la suferojn, nepre okazontajn, sed kiujn oni ne povas antaŭforigi, kaj mi ĉiam prokrastis.

Sed antaŭnelonge mi renkontis survoje buĉiston, kiu vizitis hejmon kaj nun estas revenanta Tula'n. Li estas ankoraŭ nelerta buĉisto, kaj lia ofico postulas mortpiki per ponardo. Mi demandis lin, ĉu li ne kompatas mor-

tigi brutojn? Kaj mi aŭdis de li kutiman respondon: „Kial kompati? Estas ja necese“. Sed kiam mi diris, ke nutrado per viando ne estas necesa, li konsentis, kaj samtempe konsentis, ke li ankaŭ kompatas.

„Kion fari? Ja necesas perlabori“, diris li. „Antaŭe mi timis mortigi. Mia patro,—li dum tuta vivo eĉ unu kokinon ne buĉis“. La plimulto de rusaj homoj ne povas mortigi, kompatas, esprimante tiun senton per la vorto „timi“. Li ankaŭ timis, sed ĉesis. Li klarigis al mi, ke la plej granda laboro okazas vendrede kaj daŭras ĝis la vespero. Antaŭ nelonge mi ankaŭ interparolis kun soldato-buĉisto, kaj denove lin same mirigis mia proklamo pri tio, ke oni devas kompati—ne buĉi, kaj laŭkultime, li diris, ke tio estas ordonita, sed poste konsentis: „Kiu ne volus kompati kvietan, konfidantan bruton? Ĝi iras kompatinda, fidus al ĉi. Kompatege!“

Foje ni iris piede el Moskvo, kaj survoje nin invitis kunveturi veturigistoj de ŝarĝoj; ili veturis el Serpuĥovo arbareton al komercisto, por ŝarĝi lignon. Estis antaŭpaska ĵaŭdo. Mi veturis. Sur la antaŭa ĉaro kun veturigisto, fortika, ruĝa, maldelikata, evidente, forte drinkanta vilaĝano. Enveturante vilaĝon, ni ekvidis, ke el la ekstrema korto oni trenis grasigitan, nudan, rozan porkon por buĉo. Ĝi blekis akrege per voĉo, simila al homa kriado. Ĝuste kiam ni estis preterveturantaj, oni ekbuĉis la porkon. Unu el la homoj tratranĉis ĝian gorgon per tranĉilo. Ĝi eklekis ankoraŭ pli laŭte kaj akre, sin liberigis de la homoj kaj kuris foren, kovrita de sango. Mi estas miopa kaj ne vidis ĉion detale, mi

vidis nur rozan, kvazaŭ homan korpon de porko kaj aŭdis akregan kriadon, sed la veturigisto vidis ĉiujn detalojn, kaj ne deturnante la okulojn, rigardis tien. La porkon oni kaptis, faligis kaj komencis finbuĉi. Kiam ĝi ĉesis kriadi, la veturigisto profunde ekĝemis.

„Ĉu oni neniam respondos pro tio?“ elparolis li.

Tiel forta estas en homoj la abomeno kontraŭ ĉiu mortigo; sed, donante ekzemplon, stimolante avidecon de homoj per proklamo de tio, ke mortigado estas permesita de Dio, kaj, ĉefe, dank'al kutimigo, oni igas homojn finperdi tiun naturan senton.

Vendredon mi iris al Tula kaj renkontinte konatan de mi mildan, bonan homon, invitis lin iri kun mi.

— Jes, mi aŭdis, ke tie estas bona aranĝo, kaj mi volis rigardi, sed se oni tie buĉas, mi ne eniros.

— Kial-ne? Ĝuste tion mi deziras vidi. Se oni manĝas viandon, oni bezonas ja buĉi.

— Ne, ne, mi ne povas.

Mi devas rimarki, ke tiu ĉi homo estas ĉasisto kaj mem mortigas birdojn kaj bestojn. Ni venis. Jam ĉe la enirejo oni eksentis pezan, abomenan, putran odoron de lignaĵista gluo aŭ de glua farbo. Ju pli ni proksimiĝis, des pli forta estis tiuodoro.

La konstruaĵo estis ruĝa, brika, tre granda, kun arkajoj kaj altaj kamentuboj. Ni eniris la pordegon. Dekstre troviĝis granda je $\frac{1}{4}$ de desjatino *) proksimume,

*) „Desjatino“ — rusa termezurero, enhavanta 2400 kvadratajn klaftojn.

ĉirkaŭbarita korto—ĝi estis placo, sur kiun dum du tagoj en la semajno oni alpelas vendotajn brutojn, kaj ĉe rando de tiu spaco staris dometo de kortisto; maldekstre estis, laŭ ilia nomado, kameroj, t. e. ĉambroj kun rondaj pordegoj, kun asfalta kavigita planko kaj kun meĥanikaĵoj, por pendigi kaj transloki la viandbrutojn. Ĉe muro de l'dometo dekstre, sur benketo, sidis ses aŭ sep buĉistoj en antaŭtukoj, surversitaj de sango, kun suprenlevitaj, ŝprucmakulitaj manikoj sur la muskolecaj brakoj. Pasis ĉirkaŭ duonhoro, kiam ili estis finintaj labori,—tial tiun tagon ni povis vidi nur malplenajn kamerojn. Malgraŭ ke la pordegoj estis malfermitaj ambaŭflanke, en la kamero oni flaris pezan odoron de varma sango; la planko estis tute bruna, polurita, kaj la kavaĵojn de la planko plenigis koaguliĝanta nigra sango.

Unu el la buĉistoj rakontis al ni, kiamaniere oni buĉas, kaj montris la lokon, kie oni faras tion. Mi ne bone lin komprenis, kaj faris al mi malveran, sed tre teruran koncepton pri tio, kiel oni buĉas, kaj mi imagis, kiel gi ofte okazas, ke la realaĵo faros al mi malpli fortan impreson, ol la imagaĵo. Sed mi eraris.

La proksiman fojon mi venis la buĉejon ĝustatempe. Ĝi estis vendredon antaŭ la Pentekosto. Estis varmega junia tago. La odoro de gluo, de sango estis ankoraŭ pli forta kaj sentebla, ol ĉe mia unua vizito. La laboro estis en stato de plena streĉiĝo. La tuta polva placo estis plena da brutoj, kaj oni enpelis brutojn en ĉiujn baraĵojn apud la kameroj. Ĉe la enirejo sur la strato staris ĉaroj kun bovoj, gebovidoj, bovinoj, ligitaj al la ĉar-

flankoj kaj timonstangoj. Ĉaroj, jungitaj per bonaj ĉevaloj, kun amase metitaj vivantaj bovidoj, kies kapoj pendis balanciĝante, alveturadis kaj estis sensarĝigataj; similaj ĉaroj kun viandbovoj, kies piedoj disstaradis kaj balanciĝadis, kun la fortranĉitaj kapoj, intense ruĝaj pulmoj kaj brunaj hepatoj, estis forveturantaj de la buĉejo.

Ĉe la barilo staris rajdĉevaloj de brutvendistoj. La brutvendistoj mem en siaj longaj surtutoj kun skurĝoj kaj knutoj en la manoj, marŝadis tra la korto, aŭ markante per gudro la brutojn, apartenantajn al la sama posedanto, aŭ marĉandante aŭ direktante la transigon de laborbovoj kaj de bovoviroj de la placo en tiujn barajojn, el kiuj la brutoj estis puŝataj en la kamerojn mem. Tiuj homoj, evidente, estis tutokupitaj de monaferoj, de kalkuloj, kaj la penso pri tio, ĉu estas bone aŭ ne bone mortigi tiujn bestojn, estis tiel same malproksime de ili, kiel la penso pri tio, kia estas la ĥemia konsisto de tiu sango, kiu surverŝadis la plankon de la kamero.

Neniun buĉiston oni vidis sur la korto; ĉiuj troviĝis en la kameroj, laborante. Tiun tagon estis fortranĉitaj ĉirkaŭ cent kapoj da bovoj. Mi eniris la kameron, kaj haltis ĉe la pordo. Mi haltis tial, ke en la kamero estis malvaste pro transmovataj viandbrutoj, kaj tial, ke sango fluadis malsupre kaj gutadis de supre, kaj ĉiuj buĉistoj, troviĝintaj tie, estis ĉirkaŭŝmiritaj per ĝi, kaj enirinte internen, mi nepre estus ŝmirita per sango. Unu alpendigitan viandbruton oni forpendigadis, alian oni translokadis al la pordo; tria—buĉita laborbovo estis kuŝanta per blankaj piedoj supren, kaj buĉisto, fra-

pante forte per pugno, estis disiganta la felon, streĉe fiksitan.

El la kontraŭa pordo, el tiu sama, ĉe kiu mi estis staranta, samtempe oni enkondukis grandan ruĝan, bone nutritan laborbovon. Du homoj tiris lin. Apenaŭ ili enkondukis lin, mi tuj ekvidis, ke buĉisto levis pordon super lia kolo kaj ekfrapis. La bovo, kvazaŭ oni unufrape batfalis al li ĉiujn kvar piedojn, subite kaj peze falis sur la ventregon kaj tuj ruliĝis unu flanken, konvulsiante per la piedoj kaj per la tuta postajo. Tuj unu buĉisto sin alpremis al la antaŭaĵo de la bovo, de la kontraŭa flanko de liaj baraktantaj piedoj, kaptis lin je la kornoj, alfleksis lian kapon al la tero, kaj alia buĉisto per tranĉilo tratranĉis al li la gorgon, kaj el sub la kapo ekfluegis nigre-ruĝa sango, sub kies torento la sangmakulita knabo metis ladan pelvon. La tutan tempon, kiam oni tion faris,—la bovo senĉese konvulsiis per la kapo, kvazaŭ penante sin levi, kaj baraktis per ĉiuj kvar piedoj en la aero. La pelvo estis rapide pleniĝanta, sed la bovo estis vivanta, kaj spiregante per la ventro, baraktis per la postaj kaj la antaŭaj piedoj, tiel ke la buĉistoj forkuradis flanken. Kiam unu pelvo estis plenigita, la knabo portis ĝin sur la kapo al albuminfarejo; alia knabo submetis alian pelvon, kaj tiu ĉi ankaŭ ekpleniĝis. Sed la bovo ĉiam spiregis per la ventro kaj konvulsiis per la piedoj. Kiam sango ĉesis flui, la buĉisto levis la kapon de la bovo kaj komencis ĝin senfeliĝi. La bovo daŭrigis baraktadon. La kapo nudigis, fariĝis ruĝa kun blankaj arterioj kaj prenadis

la pozon, donatan al ĝi de la buĉistoj. Ambaŭflanke de ĝi pendis la felo. La bovo ne ĉesis barakti. Poste alia buĉisto kaptis la bovon per piedo, fleksrompis ĝin kaj fortranĉis. En la ventro kaj en la ceteraj piedoj ankoraŭ vidiĝis konvulsioj. Oni fortranĉis ankaŭ la ceterajn piedojn kaj ĵetis ilin tien, kien oni ĵetadis piedojn de bovoj, apartenantaj al la sama mastro. Poste oni trenis la viandtorson al levtenilo kaj tie oni distreĉis ĝin: tie la movoj jam malestis.

Tiel mi rigardis el la pordo duan, trian, kvaran bovon. Kun ĉiuj estis samo: sammaniere fortranĉita kapo kun memmordita lango kaj baraktanta postaĵo. La diferenco estis nur en tio, ke buĉanto ne ĉiam trafis en ĝustan lokon, por tuj faligi la bovon. Jafoje okazis, ke buĉisto maltrafis, kaj bovo eksaltis, blekegis kaj, sangegante, penadis liberiĝi de homoj. Sed tiam oni lin altiris sub trabon, frapis alian fojon, kaj li falis. Mi stariĝis poste ĉe tiu pordo, en kiun oni enkondukadis bovojn. Ĉi tie mi vidis la samon, nur de pli proksime, kaj tial pli klare. Sed ĉefe mi vidis nun tion, kion mi ne estis vidinta el la unua pordo,—kiamaniere oni devigadis bovojn pasi tra tiu pordo. Ĉiufoje, kiam oni prenis bovon el la baraĵo kaj tiris lin de antaŭe per ŝnuro, ligita ĉe la kornoj,—la bovo, flarsentante sangan, kontraŭstaris, iafoje blekegis kaj penis retiriĝi. Perforte lin entiri du homoj ja ne povis, tial ĉiufoje unu el buĉistoj sin metis malantaŭ la bovo, kaptis lian voston kaj tordadis la voston, rompante ĝian ostaron, tiel ke la kartilagoj krakadis, kaj la bovo iris antaŭen.

Oni finis buĉi bovojn de unu mastro, oni kondukis brutaron de alia. Unua bruto el tiu aro de alia mastro estis ne labora bovo, sed bovoviro. Bonrasa, bela, nigra kun blankaj makuloj kaj piedoj,—juna, muskoleca, energia besto. Oni lin ektiris: li mallevis la kapon kaj kontraŭstaris obstine. Sed postiranta buĉisto, simile al maŝinisto, kaptanta tenilon de fajftubo, kaptis la voston, eltordis ĝin, la kartilagoj ekkrakis, kaj la bovo sin ĵetis antaŭen, forpuŝante homojn, tiradantajn la ŝnuron, kaj denove kontraŭstariĝis, strabante per nigra okulo, kun la sklero, plenigita de sango. Sed denove la vosto ekkrakis, la bovo sin ĵetis kaj trafis jam tien, kie oni ĝin bezonis. La buĉisto alpaŝis, alcelis kaj ekfrapis. La frapo ne trafis ĝustaloken. La bovo eksaltis, ekskuis la kapon, eklekegis kaj tute sangkovrita, elŝiriĝis de homoj kaj sin ĵetis posten. Ĉiuj homoj en la pordo sin ĵetis flanken. Sed spertaj buĉistoj kun braveco, akirita pro la danĝero, tuj ekkaptis la ŝnuron, denove la voston, kaj denove la bovo troviĝis en la kamero, kie oni lin altiris per la kapo sub la trabon, de sub kiu li jam plu ne leviĝis. La buĉanto lerte alcelis tiun lokon, kie la haroj disiĝas laŭstete, kaj, spite la sango, trovis ĝin, frapis, kaj la bela, vivplena bruto falegis kaj ekbaraktis per la kapo, per la piedoj, dum oni ellasadis el li la sangon kaj senhaŭtigis la kapon.—„Jen, malbenita diablo, eĉ falis ne ĝustaloken!—grumblis la buĉisto, distrancante al li la haŭton de ĝia kapo.

Post kvin minutoj jam elstaris la ruĝa kapo anstataŭ nigra, sen la haŭto, kun vitrecaj, senmovaj okuloj, tiel belle brilantaj antaŭ kvin minutoj.

Poste mi ekiris al la fako, kie oni buĉas malgrandajn brutojn. Tre granda kamero, longa, kun asfalta planko kaj kun tabloj, provizitaj de stabloj, sur kiuj oni buĉas ŝafojn kaj bovidojn. Tie ĉi la laboro jam finiĝis en longa kamero, odoreganta per sango, estis nur du buĉistoj. Unu enblovis kruron de jam buĉita ŝafoviro kaj frapetis lin per manplato sur la disblovita ventro; alia, junulo en antaŭtuko, ŝpruemakulita de sango, fumis cigaredon. Neniu pli estis en malluma, longa kamero, plenigita de malagrablaodoro. Tuj post mi venis laŭvide ekssoldato kaj alportis nigran, junan, antaŭnelonge naskitan ŝafideton kun ligitaj piedoj, kun makulo sur kolo kaj metis ĝin sur unu el tabloj, kvazaŭ sur liton. La soldato, evidente, konata, salutis kaj ekparolis pri tio, kiam mastro donas libertempon. La junulo kun la cigaredo alpaŝis kun tranĉilo, akriĝis ĝin sur la rando de la tablo kaj respondis, ke li estas libera dum festoj. La viva ŝafido kuŝis tiel same kviete, kiel la buĉita, disblovita, nur rapide svingadis per mallonga vosteto kaj pli ofte, ol ordinare, spiregadis per siaj flankoj. La soldato senpene iom detenis ĝian leviĝantan kapon: la junulo, daŭrigante la konversacion, prenis per la maldekstra mano la kapon de la ŝafideto kaj ektranĉis ĝian gorĝon. La ŝafideto ekkonvulsiis, la vosteto streĉiĝis kaj ĉesis svingadi. La junulo, atendente, ĝis kiam elfluos la sango, komencis rebruligi la estingintan cigaredon.

Ekfluis sango, kaj la ŝafideto agonie konvulsiis. La konversacio daŭris tute seninterrompe.

Kaj tiuj kokinoj, kokidoj, kiuj ĉiutage en miloj da

kuirejoj, kun fortranĉitaj kapoj, sangante, komike, terure saltas, svingante flugilojn!

Kaj jen, delikata rafinita sinjorino manĝegos kadavrojn de tiuj ĉi bestoj, tute certa je sia praveco, asertante du reciproke sin nuligantajn tezojn. Unue, ke ŝi, pri kio ŝin kredigas ŝia kuracisto, estas tiom delikata, ke ŝi ne povas sin subteni sole per vegetara nutraĵo, kaj ke por ŝia malforta organismo ŝi bezonas viandan nutraĵon; due, ke ŝi estas tiom sentema, ke ŝi mem ne povas ne nur suferigi bestojn, sed eĉ vidi iliajn suferojn. Kaj tamen malfortika ŝi estas, tiu kompatinda sinjorino, nur tial, ĉar oni ŝin kutimigis sin nutri per nutraĵo, malkonvena al homo; ne suferigi bestojn ŝi neniel povas, ĉar ŝi manĝegas ilin.

X.

Ni ne havas rajton ŝajnigi, ke ni ne scias tion. Ni ne estas strutoj kaj ne povas kredi, ke, se ni ne rigardos, ne okazos tio, kion ni ne deziras vidi. Ankoraŭ pli ni ne havas rajton, se ni ne volas vidi tion saman, kion ni deziras manĝi. Kaj ĉefe, se ĝi estus necesa. Aŭ se ĝi ne estas necesa, almenaŭ ĝi estas por io bezona? Sed—por nenio *).

Nur por veki bestajn sentojn, eksciti volupton, akceli

*) La dubantoj legu pri tiu temo la multenombrajn librojn, verkitaĵajn de scienculoj kaj kuracistoj,—librojn, en kiuj oni pravas, ke viando ne estas bezona por nutrado de homo. Kaj oni ne obeu al tiuj malnovtradiciaj kuracistoj, kiuj defendas neceson sin nutri per viando nur tial, ke tion konfesadis tre longe iliaj antaŭuloj kaj ili mem, ili defendas kun obstino, kun malbonvolemo, kiel oni defendas ĉiam ĉion malnovan, finontan.

malĉastecon, drinkemon. Ĝi konfirmiĝas konstante per tio, ke junaj, bonaj, ne malĉastigitaj homoj, precipe virinoj, virgulinaj, sentas, ne sciante logikan interligon,— ke la virto estas nekunigebla kun bifstekoj kaj, ekdezirante esti bonaj, forlasas viandan nutraĵon.

Kion do mi volas diri? Ke homoj, por esti moralaj, devas ĉesi manĝi viandon? Tute ne.

Mi volis diri nur tion, ke por bona vivo oni bezonas certan sinsekvon de bonaj agoj; ke homo, havanta seriozan celadon al bona vivo, neeviteble sekvas difinitan ordvicon, kaj ke en tiu ordvico unua virto, por kies atingo penados homo, estas sindeteno, sinmemregado. Kaj celante sindetenon—homo neeviteble sekvas nur unu difinitan ordvicon, kaj en tiu ordo la fundamenta agado estos sindeteno en nutraĵo—fastado. Kaj ĉe la fastado, se li serioze kaj sincere celas al la bona vivo,—antaŭ ĉio li ĉiam ĉesos uzi animalan nutraĵon, ĉar, ne parolante pri la ekscito de pasioj, produktata de tiu nutraĵo, ĝia uzado estas vere senmorala, ĉar ĝi postulas mortigon,—agon, kontraŭan al la morala sento, kaj devenas nur de avido, de frandemo. Kial la sindeteno de animala nutraĵo estas vera komenco de fasto kaj de morala vivo, estas bonege dirita, kaj ne de iu sola homo, sed de tuta homaro, per ĝiaj plej bonaj reprezentantoj dum tuta konscia vivo de la homaro.

Sed kial, se la kontraŭleĝeco, t. e. senmoraleco de la animala nutrado estis tiel longe konata de la homaro,— homoj ĝis nun ne atingis la konscion de tiu leĝo? demandos la homoj, kutimintaj sin gvidi ne tiom per sia prudento, kiom per publika opinio. La respondo al tiu

demando konsistas en tio, ke ĉiu morala progreso de la homaro, estanta la fundamento de ĉiuspeca progreso, fariĝas ĉiam malrapide, sed ke la simptomo de vera movado, ne de okaza, estas ĝia senhalteco kaj ĝia konstanta kreskado.

Kaj tiel progresas la vegetarismo. Ĝia progreso estas esprimita en ĉiuj pensoj de la verkistoj, cititaj en tiu ĉi libro, kaj en la vivo mem de la homaro, ĉiam pli transiranta senkonscie de viandomanĝado al vegetara nutraĵo, kaj konscie en la montriĝinta precipe intense kaj ĉiam pli kreskanta—la vegetara movado. Tiu ĉi movado iras la lastajn dek jarojn ĉiam pli kaj pli rapide antaŭen; ĉiam pli da libroj kaj ĵurnaloj aperas ĉiujare pri tiu ĉi temo; oni renkontas ĉiam pli da homoj, forlasantaj viandan nutraĵon, kaj eksterlande, ĉiujare, precipe en Germanujo, Anglujo kaj Ameriko kreskas la nombro de vegetaraj hoteloj kaj restoracioj. Tiu movado tute aparte ĝojigas la homojn, vivantajn per celado al la efektivigo de la regno Dia sur la tero,—ne tial ke la vegetarismo mem estas la plej grava paŝo al tiu regno (ĉiuj veraj paŝoj estas gravaj kaj negravaj), sed tial, ke ĝi estas signo de tio, ke la celado al la morala perfektigo de homo estas serioza kaj sincera, ĉar ĝi sekvas nur unu neŝanĝeblan ordvicon, komencatan de unua ŝtupo.

Oni ne povas ne ĝoji pri tio same, kiel ne povus ne ĝoji homoj, dezirantaj atingi supron de domo kaj antaŭe senorde kaj vane grimpintaj de diversaj flankoj rekte sur murojn,—kiam fine ili komencus kunveni al la unua ŝtupo de la ŝtuparo, kaj ĉiuj arigiĝus ĉe ĝi, sciante, ke la irado supren ne povas fariĝi preter tiu ĉi unua ŝtupo de la ŝtuparo.

INTERNACIA UNUIĜO
DE ESPERANTISTAJ VEGETARANOJ.
(I. U. E. V.)

Unua honora prezidanto L. N. Tolstoj. Ĝenerala sekretario kaj kasisto — J. A. Gill Lower Green Road, Rusthall, Tunbridge Wells, apud Londono, Anglujo.

Aniĝo (El la regularo de I. U. E. V.):

1) Regula ano povas fariĝi ĉiu, posedanta certan konon de Esperanto kaj sekvan- ta regule la principojn de Vegeta- rismo.

Jara kotizaĵo — Sm 1.

2) Neregula ano povas fariĝi ĉiu persono, ne scianta Esperanton aŭ vivanta nur okaze vegetare.

Jara kotizaĵo — Sm 1,50.

3) Subtenanta ano povas fariĝi ĉiu espe- rantisto, donante kotizaĵon de Sm 5.

◆

МЕЖДУНАРОДНЫЙ СОЮЗЪ
ЭСПЕРАНТИСТОВЪ-ВЕГЕТАРИАНЦЕВЪ.

М. С. Э. В.

Первый почетный членъ Л. Н. Толстой. Общій секретарь и кассиръ — Дж. Джилль, близъ Лондона, Англія.

Условія записи (Изъ устава М. С. Э. В.):

1) Дѣйствительнымъ членомъ можетъ сдѣлаться всякій, знающій языкъ Эсперанто и соблюдающій принципы вегетарианства.

Годовой взносъ — 1 рубль.

2) Членомъ-сотрудникомъ можетъ сдѣлаться всякое лицо, не знающее Эсперанто или только знакомящееся съ вегетарианствомъ.

Годовой взносъ — 1 р. 50 к.

3) Членомъ-соревнователемъ можетъ сдѣлаться каждый эсперантистъ.

Годовой взносъ — 5 рублей.

Для разъясненій относительно М. С. Э. В., сношеній съ нимъ на яз. Эсперанто и записи въ Союзъ имѣются національные секретари.

Для Россіи:

- 1) Романъ Добржанскій { Кельцы,
- 2) Стефанъ Добржанскій { ул. Рынек Польша.
- 3) А. Н. Шарапова — Москва,
Дѣвичье Поле, Трубецкой пер., № 10, кв. 18.

La **Muziko** diris: Mi min trovis, kiam mi eksciis, ke la Koro de la Humaneco ĉie pulsas per sama ritmo.—Peace Pipe Press, Seatlo, Wash.

El la internacia gazeto „**La Simbolo**“, Marto 1911, Symbol Publishing C^o. Post Office Box 1020. Tacoma, Washington, U. S. A.— Abonprezo exsterlande Sm 2,50 (2 рубля 50 коп.) Konto ĉe la ĈEKBANKO ESPERANTISTA, London.

The Peace Pipe angla gazeto de Charles Eugene Sanks — P. I. Building, Seattle, U. S. A. Sendu du respondkuponojn (aŭ dek cendojn) kaj ricevu reterne specimenan ekzempleron kun dek „Little Hierograph“ poŝtkartoj. Tiam vi povos envicigi vin en tutmondan movadon, por konservi la vivon de la birdoj, bestoj, fiŝoj, arboj, floroj. Oni konsentos liberalan rabaton al agentoj.



851



BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

112-121 I